

El la artikolo
"Animbela persono, animbela lingvo"
de Zhang Qicheng
El Popola Ĉinio, 1989-12
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 1990-004-A-3, 1990.02.08

Cl.- Parolas Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

A.- Post la pekinaj eventoj kun studentoj murditaj kaj kondamnitaj sen defendorajto, ni trafolumas la revuon **E1 Popola Ĉinio** kun malpli da fido rilate al la artikoloj, kiuj celebradas la progresojn de komunisma registaro nedemokrata. La ĉina junularo petis pli da libero kaj justeco. Ni nin demandas, kiel finiĝos tiu diktaturo: ĉu ankaŭ en mizerego kaj malsato, kiel en orienta Eŭropo ekskomunisma?

Cl.- La lasta numero 1989-a de **E1 Popola Ĉinio** per artikolo, kiu omaĝas al la 130-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, montras, ke en la esperantistaro ĉina restas vivanta la idealo, kiun doktoro Esperanto provis disvastigi kun sia lingvo. Hodiaŭ ni citos erojn el tiu teksto, kiun ni ŝatis trovi en **E1 Popola Ĉinio**. Eĉ se ĝi silentas pri la nuna malpaco inter la regantoj kaj regatoj, kiu kontraŭas la zamenhofan spiriton, ĝi almenaŭ predikas favore al paco inter la nacioj. Kaj tra la linioj oni sentas, ke la aŭtoro emus multon pli diri. Ni citu erojn el tiu artikolo de **ZHANG QICHENG**:

A.- "Dank' al la penado kaj polurado de Zamenhof, finfine prezentiĝis al la mondo Esperanto, kiu estas belsona, simpla, facile lernebla, logika kaj viveca. Kaj tiu lingvo havas, krom forma beleco, ankaŭ animan belecon. Fakte, lingvo estas nur ilo por interŝanĝi sentojn, por ĝi ne eblas havi animon kiel homoj, por ne paroli pri beleco de animo. Tamen, Esperanto diferencas de la aliaj lingvoj, ĝi havas animan belecon, tio estas ĝia kreinto enverŝis sian amon al la homaro en tiun lingvon kaj formiĝis "interna ldeo".

Cl.- Oni povas diri, ke Zamenhof donis sian atenton kaj entuziasmon al tiu idealo pli, ol al Esperanto mem. Ĝuste pro tio, kiam iuj lin konsilis, ke Esperanto evitu ligi esperantismon kun la ideo, nia majstro, ĉiam modesta kaj multepacienca, ekkris indigne:

A.- "Ho, kiaj vortoj! ... Ho, ne, ne, neniam ! Kun energia protesto ni forĵetas tiun ĉi postulon. Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni neniigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno: "Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan."

Cl.- ZHANG QICHENG titolis sian artikolon **Animbela persono, animbela lingvo**. Li daŭrigas skribante: "Kiel forte indignaj vortoj! Dum cent jaroj Esperanto disvastiĝis en pli kaj pli multaj lokoj de la mondo, plaĉis al pli kaj pli multaj homoj, ne nur pro sia simpleco, beleco kaj praktika valoro, sed ankaŭ pro la alta idealo entenata de ĝi. De pasinteco ĝis nun, multe da personoj sin dediĉis al la Esperanta laboro kaj prenis disvastigon kaj uzadon de Esperanto kiel sanktan aferon. Ilia movforto kuŝas en tio, ke Esperanto ne nur estas lingvo, sed ankaŭ idealo. Ĝuste kiel Zamenhof diris: "Ĉiuj ŝatis Esperanton ne tial, ke ĝi alproksimigas la cerbojn de la homoj, sed nur tial, ke ĝi alproksimigas iliajn korojn."

A.- E1 la konkludo de tiu artikolo de ZHANG QICHENG ni ankoraŭ citu kelkajn liniojn: "Kompreneble, Esperanto, kiel lingva komunikilo, devas kiel eble plej bone disvolvi sian praktikan rolon, por ke la homoj konu ĝin, nur tiam ĝi povos enradikiĝi en la reala vivo. Tamen, ni neniel devas forĵeti ĝian altan idealon, ĉar forĵeti ĝian idealon signifas forĵeti ĝian avantaĝon super la aliaj lingvoj. Same, ni esperantistoj neniel devas rigardi nin mem kiel personojn posedantajn nur iun lingvon, aŭ ordinarajn lingvistojn, sed devas konscii, ke ni estas batalantoj por la alta idealo! Ni devas havi ne nur ordinaran laborfervoron, sed ankaŭ sindonemon al la sankta afero. Ni devas lerni de Zamenhof lian konduton, kaj pli grave, daŭrigi kaj disvolvi lian spiriton por firme kaj senlace batali por la idealo."

Cl.- Okaze de prelegvojaĝoj mi konstatis, kiel vigle kultiviĝas la idealo zamenhofa en la landoj, kie mankas respekto al plej elementaj homaj rajtoj. Esperanto estas danĝera lingvo fakte por la perfortemuloj. Tial ili emis persekuti la esperantistojn. Ankaŭ mi povis vidi la malamon, kiun la orienteŭropaj popoloj havas por la rusa lingvo. Tiu lingvo paktis kun sistemo absolute kontraŭa al la zamenhofa idealo, kaj nun ĝi rikoltas la malamon, kiun ĝi semis. Ne pacon povas rikolti reĝimoj, kiuj sin trudis per murdoj, nur venĝemon. Dank'al Zamenhof, esperanto ne kompromitiĝis kun komercismo, bankismo kaj imperiismo. Tial ĝi povas resti idealo kaj konservi sian forton por la amasoj, eĉ se beletristoj opinias tekston, kiel la ĵus legitan, eksmoda kaj nebuleca.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND diras al vi: ĝis reaŭdo!